# La Karavelo

Beletra Esperanto-Revuo pri la Portugallingva Literaturo

n-ro 005
februaro 2008


Fondita de João José Santos, en Portugalio, en oktobro 2007





## 1908
## 1-A DE FEBRUARO
## LISBONO

# FIMURDOJ



**Reĝo**
**Don Karlo**



**Princo**
**Don Ludoviko Filipo**

## *Enhavo de La Karavelo n-ro 005*


| | | |
|---|---|---|
| **1** | *Kovrilo* | *El la redaktejo* |
| **2** | *Enhavo – Kolofono* | *El la redaktejo* |
| **3** | *Entreprenado per esperanto. (eseo)* | *João José Santos* |
| **5** | *Fernando Pesoo (poezio):*<br>*Mesaĝo (13-a, 14-a, 15-a)* | *João José Santos* |
| **5** | *Rikardo Rejso (Fernando Pesoo):*<br>*El ĉio restas nulo (poezio)* | *Francisco Stefano Wechsler* |
| **6** | *Kamonio (poezio):*<br>*Se Helnjo l' okulojn* | *João José Santos* |
| **7** | *Laŭ la spuroj de Claude Piron - omaĝo* | *Leo De Cooman* |
| **8** | *Mondo malplena (rakonto)* | *Geraldo Mattos* |
| **10** | *Ĉu vi palindromas? (amuzo)* | *Paulo Sérgio Viana* |
| **11** | *La ribela abelo (rakonto)* | *Luiza Carol* |
| **11** | *Guido Gezelle (poezio): Pisofloro* | *Leo De Cooman* |
| **12** | *Joĉjo kaj Johano (rakonto)* | *João José Santos* |
| **13** | *Poezio:*<br>*Jan Kasprowicz: Atendis mi vin hieraŭ...*<br>*Kazimierz P. Tetmajer: Se vi estus...*<br>*nekonata aŭtoro: Ĉu vi memoras...?* | *Edward Jaśkiewicz* |
| **14** | *Diboĉeta esperanto-renkontiĝo (rakonto)* | *Valentin Melnikov* |
| **17** | *Poezio:*<br>*Mia amikaro*<br>*Valentino Melnikov naturistas*<br>*Mi estas pozisto*<br>*Beloj* | *Nikolaj Neĉaev* |
| **17** | *Graholy Zoé (poezio):*<br>*Kial mi estas?* | *Tibor J. Szabadi* |
| **18** | *Anonima: Heja ho viroj! (poezio)*<br>*Kolumbano: Jen, la ŝipet' (poezio)* | *Gerrit Berveling* |
| **20** | *Jorge José Gotardi (poezio):*<br>*Nuboj...* | *Roger Gotardi* |
| **21** | *Anonima (kroniko):*<br>*Reĝmortigo* | *Eduardo Novembro* |
| **22** | *Sándor Petőfi (poezio):*<br>*Malgajite* | *Imre Szabó* |
| **23** | *La lastaj portugaliaj reĝoj (historio)* | *João José Santos* |
| **24** | *Fotoraporteto:*<br>*Urbeto "Vila Viçosa", en Portugalio* | *João José Santos* |










*El la redaktejo...*

## *Kolofono*


***Konstantaj verkistoj...***
*Eduardo Novembro*
*Edward Jaśkiewicz*
*Francisco Stefano Wechsler*
*Geraldo Mattos*
*Gerrit Berveling*
*Imre Szabó*
*Irina Mironova*
*João José Santos*
*Leo De Cooman*
*Luiza Carol*
*Nikolaj Neĉaev*
*Paulo Sérgio Viana*
*Roger Gotardi*
*Tibor J. Szabadi*
*Valentin Melnikov*

***Verkis ĝis nun en La Karavelo 22 homoj el 11 landoj, tiel...***
*Belgio 1, Brazilo 5, Britio 1, Grekio 2, Hungario 4, Israelo 1, Italio 1, Nederlando 1, Polio 1, Portugalio 2, Rusio 3.*

***Proprietulo, Direktisto, Redaktisto, Kompostisto***
*João José Santos*
***Asistanto pri pentrarto kaj dramo***
*João Pereira dos Santos*
***Reviziisto***
*Roger Gotardi*



***PoŝTel.:*** +351 960 13 15 15
***RetPoŝto:*** lakaravelo@gmail.com

http://groups.google.com/group/lakaravelo

http://www.gazetejo.org/node/1120

***Adreso:***
*LA KARAVELO*
*Fonte Velha, Caixa 3003*
*7100-078 Estremoz – Portugal*


***Recenzeblaj libroj:*** estu sendotaj al la supra adreso.

***Reguloj:*** Pri la principoj, labormaniero kaj reguloj de La Karavelo, elŝutu la koncernajn dosierojn el nia retpaĝo.

libera softvaro - programas livres
© João José M. Q. dos Santos

*El la redaktejo...*



# La onto: la espo-entreprenoj.

**de João José Santos**
joaojosesantos@gmail.com

## ENKONDUKO

Ni esperantistoj povas aserti, ke la historio de la internacia espo-movado estas, en multaj aspektoj, plensukcesa. Dum 121 jaroj, oni malfermis klubojn kaj asociojn, oni publikigis centojn da revuoj, oni verkis milojn da libroj, oni starigis milojn da kursoj, oni organizis eventojn, oni tuŝis kelkajn politikajn instancojn, nu resume oni sternis esperanton tra la planedo.

Tamen, mankas io, mankas io, kio kapablu katapulti la uzadon de nia lingvo en la urbojn, en la vivon de la ĉiutaga civitano: mankas entreprenemo, kiu kondukos la homojn al plena uzado de esperanto.

## LA FANATIKULOJ

Antaŭ ol daŭrigi la rezonadon, estas utile iom priparoli la emon de kelkaj, kiuj, rigardante esperanton kvazaŭ religion, pensas ke la mona individua intereso, en la esperanta agado, iel malpurigas la bonajn intencojn de la homoj kaj la sanktajn celojn de la genia verko de Zamenhofo. Tiu rezono elvenas ĝenerale el kelkaj latinidaj mensoj, kies kultura rilato kun la mono estas malsana, ĉar ili konsideras, ke la mono estas, en si mem, io malbona ĉar malpuraĉa. Tiuj, kiuj iom pripensis la aferon, komprenas tre bone la diferencojn inter latinidaj teniĝoj kaj ĝermanidaj teniĝoj, rilate al monhavo. Ĝermanida homo estas ĝenerale laŭdata en sia socio, se li sukcesis disvolvi negocon, partopreni en la socia organizado, dungi homojn kaj riĉiĝi. Samafere, latinido estas ĝenerale aĉe kritikata, kvazaŭ li estus ŝtelisto, kvazaŭ ne eblus ke honesta homo havu monan kaj socian sukceson.

Oni komprenu, ke la homaj agadoj nur ekhavas vere grandskalan gravecon, kiam oni kapablas vendi servojn kaj varojn por mono, do kiam oni kapablas konverti la diverstipajn valorojn en ekonomian intereson. Vole aŭ nevole, plaĉe aŭ neplaĉe, tiaj estas la socioj kreitaj de la Homo. Ĉu estas dezireble modifi tion aŭ ne, tio estas politika diskuto, kiu ne enkadriĝas en la temo de ĉi tiu artikolo. La esperantistoj devas labori surbaze de realaj situacioj, ne surbaze de antaŭjuĝoj kaj de utopioj, kiuj facile enmetus la esperantistaron en la sakon de la marĝenaj frenezuloj. Tiaj ni ne estas. Nia utopio estas plenumebla. Ĝi estas utopio similtipa al forigo de sklaveco, al in-egaleco, al milit-estingo kaj al multaj aliaj kiuj avancigas la sociojn survoje de la justo, bono kaj feliĉo. Nia revo, ke la homaro internacie uzu helplingvon por plibonigo de la homa vivo, efektiveblas enkadre de la reala vivo de la nuntempa homaro. Aliaj utopioj, pli aŭ malpli valoraj kaj validaj, estu pritraktataj far la espo-movado, kiel privataj aferoj de homoj kiuj, i.a., povas ankaŭ esti esperantistoj.

## LA DILETANTOJ



Bill Gates revis por mondo plena je komputiloj.

En la kontraŭa strio de la spektro, estas alia speco de homoj, troveblaj ankaŭ en la espo-movado: estas la diletantoj. Tiuj uzas esperanton por propra konsumo kaj estas ĝenerale avaraj, ne donante sian laboron nek alian bonon al la disvolviĝo de esperanto. Tiuj nur amas sin mem, profitas kiel eble plej multe de la laboro de la aliaj, kaj fuĝas je laboro kaj responsoj. Kiam faras ion, ili serĉas ĉefe la evidentiĝon de sia nomo, la aplaŭdon. La subtitolo "diletanto" brilas malpli akuzeme ol la subtitolo "egoisto", do mi ne ŝanĝos ĝin.

Ili rajtas esti tiaj, tamen ofte ili estas obstakloj al la laboro de tiuj, kiuj volas realigi la utopion de Zamenhofo, ĉar la diletanto nur pensas pri sia ĝuo, plezuro, nomo kaj gloro. Tiaj ekzistas en ĉiuj sektoroj de la espo-agado. Ne estas facile labori kun homoj, kies celo centriĝas sur la nivelo de sia propra umbiliko. Preferindas labori kun la fanatikuloj.

## ENTREPRENADO




Luther King revis por mondo sen rasismo.

En la historio de nia movado, estis homoj, kiuj preferis investi en entreprenoj rilatantaj al esperanto, ol en aliaj negocoj, kiuj donus al ili pli da mono kaj malpli da laboro. Temas pri opcioj, kiuj ne centriĝas ekskluzive en la celo de monprofito, sed kiuj havas aliajn motiverojn, el kiuj reliefiĝas ĉi tiu: la emocia plezuro labori ankaŭ por la bono de aliuloj kaj de la onta mondo, kie vivos liaj filoj kaj nepoj. Ĉiuj profesioj devus esti tiaj. Ĉiuj devus doni ne nur monon, sed ankaŭ altgradan

plezuron kun profunda satigo de intelektaj, emociaj kaj filantropaj sentoj. La entreprenemaj esperantistoj povas ĝui tiun tutecon de profitoj, kiuj, neplenigante al ili la poŝon, certe plenigas la koron.

Tiuj kiuj envojiĝis en tiun padon ankoraŭ estis malmultaj, kaj surpaŝis la padon solaj. Por ke la sukceso de la unuopaj espo-entreprenoj estu sekura, forte kontribuos la sukceso de aliaj espo-entreprenoj. La espo-movado jam estas tutmonde sufiĉe granda, por ke kreiĝu, ene de ĝi, kelkaj komercaj sinergioj, kiuj neniam estis esploritaj laŭ organizita maniero.



Mahatma Ghandi revis por la forto de la paco.

La apero de interreto, la disvolviĝo de internaciaj rilatoj, la oftigado de individuaj vojaĝoj, kaj aliaj fenomenoj de la 20-a jarcento, portis novajn oportunojn al esperanto. Nuntempe, ĉio povas organiziĝi per interreto, kun kompreneblaj avantaĝoj. Bonaj entreprenaj solvoj, taŭge starigitaj sur la reta subteno, kaj interligitaj inter si, povas fariĝi efika platformo por la kreado de ties sinergioj. Ĉu mi revas!? Tute ne, tion faris Zamenhofo plensukcese. Mi nur sekvas lian revon.

La idealo, kiu strebas al pli bona mondo, devas konkretiĝi en efika laboro por la konstruo de tiu mondo. Ni ne plendu, ke la politikistoj kaj aliaj homoj ne atentas pri esperanto. Ni uzu la lingvon, pruvante ke ĝi ekzistas. La multobliĝo de espo-entreprenoj de tradukado kaj interpretado, de libroeldonado, de turismaj burooj, de gastigado kaj de multaj aliaj negocoj jam estas eblaj en la nuna situacio de esperanto en la mondo. Ju pli da tiaj entreprenoj aperos, des pli da sinergioj povas esti kreataj por la reciproka apogo; ĉar ja la plej bona partnero de espo-entrepreno devas esti alia espo-entrepreno. La kreado de tiaj protokoloj gravos por la pluekzisto ĉefe de la plej etaj firmoj. Kiel granda internacia grupo, ni povus fari ioman memprotektadon, aĉetante la varojn kaj servojn komercigitajn en esperantio.

## LA ESPERANTO-ASOCIOJ

Kaj do, kiu estas la rolo de la landaj asocioj, en ĉi tiu nova espo-mondo? Ili jam estis tre gravaj, kaj povas daŭre esti gravaj. Tamen, por tio, ili devas aktualiĝi. Se male, efektiviĝos tutuniversa leĝo: organo ne uzita... reduktiĝas ĝis... malapero. La atletoj scias, ke la muskolekzercado nepras por ke la muskoloj estu efikaj. Intelektuloj scias, ke la kapablo lerni dependas de antaŭaj lernspertoj. La landaj asocioj kaj aliaj espo-kluboj devas serĉi sian lokon en ĉi tiu konstante transformiĝanta mondo.

Antaŭe, en la espo-asocioj, la esperantistoj renkontiĝis por trejniĝi en la lingvo-kapablo, kaj ankaŭ por amikiĝi. Tie oni abonis revuojn kaj aĉetis librojn. Tie oni lernis kaj instruis esperanton, kaj tie oni preparis la materialojn por disvastigadaj eventoj.

La leganto certe bone komprenas, ke komputiloj kaj interreto vaste kaj profunde modifis la manieron vivi kaj organiziĝi, atingante ankaŭ la espo-asociojn. Multaj el la funkcioj de la espo-asocioj estas nun plenumitaj en la reto, pli rapide kaj pli efike.

Niaj asocioj devus fari la ponton inter la esperantistoj kiuj ne retumas kaj la reton, devus apogi kaj helpi la organizadon de la spontanaj fokusoj de esperanta agado, devus krei strategian planon por la avanco de esperanto en la socio, ktp. La espo-asocioj povas ankoraŭ fari multon, se ili ne fermiĝos en si mem. La diversmaniera apogo al la naskiĝantaj espo-entreprenoj povas fariĝi unu el la plej valoraj agadoj de la asocioj, en mondo kie, espereble, esperanto eniros en la socian vivon de la homoj.

Atentu, ke la senfunkciado ne nuligu tiujn organojn de la espo-movado, la espo-asociojn, kiuj havas sian ĉarmon.

## KONKLUDO

La mondo ŝanĝiĝas, kaj la espo-movado devas akompani tiujn ŝanĝojn konscie, ne per treno far la cirkonstancoj.

Nuntempe gravas profiti la retajn rimedojn, gravas ke sen-time oni kreu komercajn sinergiojn en la espo-movado, gravas ke oni evoluigu niajn asociojn, por ke ili fakte servu la movadon.



Ludoviko Lazaro Zamenhof revis por pli komprenema mondo.

Gravas ĉefe, ke ni kredu, ke *la revo komandas la vivon*, kiel asertas verso de la portugala poeto "António Gedeão" [an'tonju jhedi'ãu].

## Mesaĝo

**de Fernando Pesoo**
*trad. João José Santos,*
*el la portugala*



Almado Negrejro,
Fernando Pesoo,
(1935)

### 3-a - Don Petro, Regento de Portugalio

Kun klaro en la penso kaj la sento,
stas klara mi en volo;
senzorga pri sukcesa elatento
al la havaĵa preno;
duobla mastro, sen disiĝa sento,
de la devo kaj esto.

Ne min protekti povus tial Sorto,
ĉar mi ne stas tiesa.
Tiaj jen mia vivo kaj la morto:
kalma sub stel' forgesa,
fidela al ide' kaj deva vorto.
La cetero stas Dia!

### 4-a - Don Johano, Infanto de Portugalio

Neniis mi. Malvastis mi-animo
inter grandaj animoj de kunuloj,
sencele elektita,
kaj virge apatia;

La portugal', de vastaj maroj patro,
volas, nur povas tion:
tut-maron, aŭ rompitan vanan ŝipon:
La tuton aŭ nenion.

### 5-a - Don Sebastiano, Reĝo de Portugalio

Freneza, jes, ĉar mi volis la grandon
ne donatan de l' Sorto.
El mi elfluis mia certo;
kaj do, en la sablaro
restis mia est' inta, ne la nuna.

Mian frenezon prenu aliuloj
kun la kerno de ĝi.
Kio stas homo sen frenezo?
Ĉu pli ol sana besto,
prokrastita kadavro kiu naskas?



## El ĉio restas nulo

*(odo 104 - 1932-9-28)*

**de Rikardo Rejso**
*(Fernando Pesoo)*
*trad. Francisco Wechsler,*
*el la portugala*

El ĉio restas nulo. Ni nenias.
Sub suno kaj aer' ni malfruetas
Al la sufoka nigro de l' humila
Sur ni trudota tero,
Kadavroj prokrastitaj sin bredantaj.

Statuoj, leĝoj, odoj tombon havas.
Se ni karnoj, al kiuj sangon donas
Ena suno, vesperas, kial ili
Malsamus? Ni nur estas
Fabeloj farantaj fabelojn, nulo.



Cristóvão de Morais,
Don Sebastiano, reĝo de Portugalio (1554-1578),
(1571)

El la portugala muzo...

## Se Helnjo l' okulojn

**de Kamonio**
*trad. João José Santos*
*el la portugala (kaj notoj)*

MOTO

Se Helnjo l' okulojn
el kampo fordisos,
plantoj belaj misos.

DISVOLVIĜO

Paŝtiĝantaj gregoj!
pri l' verdaĵ' bonguste,
vi ĝin ŝuldas juste
al helnjaj okuloj.
Sub ties etoso,
eĉ ventoj serenas,
herbaĉoj edenas.
Pro ili, mont' floras,
la fontoj kristalas...
se en kamp' fatalas,
en vivoj aŭroras.

De ŝi vivoj pendas,
de ŝia lumflako,
kiel pom' en stako.
La homkorojn kaptas
per nehoma ravo;
en l' okula gravo
l' animoj beatas.
Amor' surgenue
gapas sen formuloj
al ŝiaj okuloj.





Camille Pissarro,
La ĝardeno de la pentristo
en Eragny,
(1898)



Acoroj, portugalia insularo

## Literaturaj notoj pri la poemo "Se Helnjo l' okulojn"

La lirika produktado de Kamonio aperas en du ritmaj mezur-tipoj: la novmezuro, kaj la malnovmezuro.

La novmezuro estas la heroa verso de Petrarko, la inventinto de la soneto. Tiu verso havas la grandecon de dek ritmaj silaboj, kaj la ĉefaj akcentoj de la verso kuŝas sur la sesa kaj la deka ritmaj silaboj. La temoj estas tipe renesancaj. Tiaj estas la versoj de *La Luzidoj*, kaj evidente la versoj de la kamoniaj sonetoj, kiuj estas ĉiam perfekte petrarkaj.

La malnovmezuro estas mezepoka kaj havas diversajn devenojn. Ĝi dividiĝas laŭ du ĉefaj tipoj: la poemoj kies versoj estas sepsilabaj, kaj tiuj kies versoj estas malpli ol sepsilabaj. La unuaj versoj estas nomitaj "grandaj redondiljoj", kaj la duaj "etaj redondiljoj". La temoj estas evidente la mezepokaj, en ambaŭ. Kamonio vivis en la fino de mezepoko, do en la renesanco, kaj kompreneble foje okazas, ke lia liriko estas influita de ambaŭ temaroj, kiuj sin riĉigas reciproke, foje en la sama poemo.

Jen la poemo publikigita en La Karavelo n-ro 4, *Endeĉoj al la sklavino Barbaro*, jen ĉi tiu, *Se Helnjo l' okulojn*, estas konstruitaj en etaj redondiljoj, kaj evidente tiel tradukitaj al esperanto.

En ĉi tiu poemo, la lirikulo parolas pri virino kiu havas mezepokajn, sed ankaŭ renesancajn trajtojn. Helnjo memorigas onin, kaj pri la belaj mezepokaj kamparanaj fraŭlinoj, kaj pri la palacaj damoj al kiuj la nobeloj almozis la atenton. Tiaj du virinoj aperas en aliaj poemtipoj kaj temaroj kelkajn jarcentojn antaŭ ol Kamonio.

La temo estas la okula beleco de Helnjo, kiu hiperbole estas komparata al diino, el kies okuloj dependas la viviĝo de la propra naturo. La poemo sugestas, ke la verdaj okuloj de Helnjo verd-igas la kampojn. Tiel ĉiuj estuloj kaj vivoj dependas de ŝi. Tiu potenco influi la naturon fariĝos trajto de skolo, kiu nur estis aperonta tricent jarojn post Kamonio: la romantikismo. Ĉi tie, tiu hiperbolo estas uzata por indukti al la nepra absorbo de tia beleco. La homoj, kvazaŭromantikisme, estas altirataj al la okuloj de Helnjo pro la beleco, kiu magnetas la koron kaj forigas la rezonadon; tiel ke eĉ la propra Amoro genufalas al ŝiaj okuloj. La simileco kun la romantikismo estas evidenta. Tamen, Kamonio naskiĝis en 1524, kaj Göethe en... 1749.

*En karavelo esperantisma...*



# Laŭ la spuroj de Claude Piron - omaĝo

**de Leo De Cooman**

Mi nur unufoje vidis Claude Piron. Tio okazis en Bulonjo-ĉe-Maro, en 2005, de malproksime, en salonego, dum lia prelego. Mi cetere neniam renkontis lin persone, sed havis la feliĉon multe korespondi kun li. La plej bona maniero konatiĝi kun tiu rimarkinda persono sendube estas legi liajn artikolojn pri la plej diversaj aspektoj de nia lingvo.

Li naskiĝis en Namur, urbo en la franclingva parto de nia lando, Belgio. Mi trovis liajn artikolojn tradukendaj kaj prezentendaj al niaj samlingvanoj, por ke ili sciu la argumentojn por Esperanto. Mi tiel entuziasmiĝis, ke mi kuraĝis sendi respektoplenan mesaĝon al la fama verkisto kaj proponis volonte traduki liajn artikolojn. Baldaŭ mi ricevis afablan respondon kaj mi eknederlandigis la tekston. Poste mi tradukis el la franca, kaj mi memoras, ke mi diris al mia edzino (denaske franclingva), ke la franclingva stilo de sinjoro Piron estas ege pli malfacila ol la ekzercoj, kiujn niaj instruistoj igis nin fari en la lernejo. Por traduki el la franca, mi unue Esperantigis la tekston, ĉar evidente estas pli facile trovi taŭgan vorton en Esperanto ol en mia gepatra lingvo.

En 2006, mi ekkunlaboris kun grupeto da volontuloj por traduki mesaĝojn al kaj el la forumo de Eŭropunia Komisionanino Margot Wallström, pere de Esperanto kiel pontlingvo. En tiu forumo aperis preskaŭ ekskluzive anglalingvaj mesaĝoj. Nia grupo plurlingvigis la mesaĝojn kaj sendis la diverslingvajn versiojn en la forumon. Iun tagon, la iniciatinto de nia grupo, Andrea Fontana, sukcesis varbi Claude Piron en nian grupon. Komence de 2007, mi ekprenis la kunordigadon de la grupo. Sinjoro Piron tuj kuraĝigis min per simpla mesaĝo. Tia li estis: ĉiam kuraĝigis, konsilis en perfekta, klara kaj senerara lingvaĵo. En la multaj tekstoj, kiujn mi tradukis, mi entute nur unufoje trovis erareton en franca teksto lia. Kompreneble temis nur pri tajperaro, kiun li pretervidis. Claude toleris nek erarojn, nek maljustaĵojn, nek insultojn, nek malĝustaĵojn.

Kvankam li neniam menciis sian scipovon pri la nederlanda, li tamen kontrollegis miajn tradukaĵojn kaj foje starigis demandon pri iu preciza vorto aŭ esprimo. Li faris rimarkon pri iu vorto, kiun li siatempe alie lernis... Nu, la nederlanda evoluis en tiu tempodaŭro de sesdek jaroj. Li vere interesiĝis pri ĉiuj lingvoj. En freŝdata mesaĝo, li rakontis, ke li, en la lernejo, fervore lernis la nederlandan, kontraste al siaj samklasanoj, kiuj ne vidis la neceson lerni tiun lingvon.

Iam, en mesaĝo, Claude skribis: "Mi estas tre kontenta, ĉar mi sukcesis trovi kaj enmeti la ĉinajn ideogramojn por kelkaj ekzemploj, kiujn mi ĉerpis el la ĉina!" Tia estis Claude: infanece malferma, feliĉa pro la fakto, ke li sukcesis solvi malfacilaĵon per sia komputilo. Aminda persono!

En liaj majstre verkitaj artikoloj, li traktas ĉiajn eblajn aspektojn de Esperanto. Lia psikanalizisteco miaopinie en tio ludis gravan rolon: li funde analizis kaj la psikon de Zamenhof, kaj la psikojn de averaĝaj homoj rilate al Esperanto ... kaj tiujn de iuj politikistoj.

La plej bona maniero omaĝi estas labori por la sama celo. La spirita heredaĵo de Claude troviĝas en liaj tekstoj. Unua tre grava, kaj samtempe interesa tasko estas legi liajn artikolojn. Esperantlingvaj artikoloj troveblas interrete ĉe

http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto

Tradukaĵoj en diversaj lingvoj troviĝas ĉe http://claudepiron.free.fr/articles.htm

Dua grava tasko, iom pli pena, sed pli utila al la ekstera mondo, estas traduki la artikolojn en niajn naciajn lingvojn, kaj igi ilin alireblaj al ĉiuj homoj. Claude verkis siajn tekstojn ne nur por Esperantistoj, sed ankaŭ, aŭ eĉ ĉefe, por la ne-Esperantista mondo. Li lastatempe oftege reagis en la franca kaj en la angla en retejoj, kiaj

http://fr.answers.yahoo.com

http://answers.yahoo.com



*Claude Piron (1931-2008)*

Antaŭ nelonge, li prezentis serion de dek filmetoj pri lingvoj ĝenerale, en la franca, i. a.

http://www.youtube.com/watch?v=taLXSe4c498

kaj unu pri Eo en la angla

http://tinyurl.com/yufhd7

kun plurlingvaj subtekstoj. Supozeble, tio estis stresigaj momentoj por li. Li tamen senlime dediĉis sin al Esperanto. Tre leginda estas lia verko "Esperanto, ĉu verko de Dio?", havebla ĉe

http://claudepiron.free.fr/articlesenesperanto/verko.htm

Kiam mi legis la mesaĝon pri la forpaso de Claude, mi sentis doloron similan al tiu, kiun mi sentis antaŭ kelkaj semajnoj, kiam nevo telefonis al mi por anonci la morton de mia kara plej aĝa frato, kiu samtempe estis mia baptopatro.

La plej taŭga omaĝo, kiun ni povas fari al vi, kara Claude, estas ke ni sekvu vian ekzemplon kaj disvastigu vian spiritan heredaĵon. Tion ni intencas fari.

*En karavelo esperantisma...*



# Mondo malplena

## de Geraldo Mattos

**Geraldo Mattos Gomes dos Santos,** brazilano de 1931.06.28, esperantisto de 1947, membro de la *Akademio de Esperanto* de 1970, kaj ĝia prezidanto inter 1998 kaj 2007, trioble. Diplomiĝis li pri latina kaj latinidaj lingvoj en la *Pontifika Katolika Universitato de Paranao* en 1958, kaj doktoriĝis en 1965 pri filologio, per disertacio pri la kantikoj (trobadoraj poemoj) de kleriko "Ayras Nunes", galega poeto de la XIV jarcento. Geraldo verkis siajn unuajn poeziajn librojn en 1953: *La Tento de la Junulo* kaj *Ivan VI.* Li laciĝis esti poeto en 1987 pere de la libro *La Deveno de Esperanto,* eldonita de Fonto. Pri li kiel homo kaj aganto estas informoj en

http://www.gmverda.com.br/>www.gmverda.com.br



Deino fotita de alia galaksio, far JJS.

Estis foje Deino, kies interno estis ekstere kaj kies ekstero estis interne, sed ili estis tiel vastaj, ke la randoj de la interno tuŝis tiujn de la ekstero, kaj la randoj de la ekstero tiklis tiujn de la interno. Ŝi havis nenian tempon, ĉar tiam ne ekzistis tempo: la estinteco samtempis kun la estonteco, kaj ilin kovris la estanteco, kiu neniam moviĝis tien kaj reen, sed el la estinteco kaj la samtempa estontenco la estanteco faris unu solan linion. Tiu linio okupis nenian lokon, ĉar tiam ne ekzistis spaco, kiu dependas de la tempo iri de estinteco al pasinteco, kiujn neniigis la estanteco.

La paradokso de tio estis kreita de la senmezura grandeco de la interno kaj ekstero de Deino, kiuj devigis ŝin neniam moviĝi en alian spacon, ĉar ŝi jam estis ĉie, kaj do estis nenie, kien ŝi povus iri. Plia paradokso estis kreita de la senmezura grandeco de la tempo, kiu disigis estintecon de estonteco pere de ilin tuŝanta estanteco, kaj devigis ŝin neniam moviĝi en alian tempon, ĉar ŝi jam estis ĉiam ĉie, kaj do estis neniam, kiam ŝi povus iri.

Post kelkaj jarmiloj da infinitoj, Deino konsciis sian solecon sen loko, kien iri, kaj sen tempo, kiam iri. Ŝi do pensis de si al si mem, kaj la longa penso estis tiel fulme pensita, ke ĝi jam estis pensita antaŭ ol esti pensata. Ŝi tamen pensis, kaj dufoje pensis, kaj trifoje pensis, kaj plurfoje pensis:

- Se mi vidas nenion malposte en la estinteco kaj nenion poste en la estonteco, tio egalas al unu sola, kaj unu sola egalas al unu sola soleco, ĉar ĝi estas ĉiea kaj ĉiama soleco.

Ŝi ĝemis.

Ŝia ĝemo estis sensona infinito, kiu forpuŝis la estintecon kaj la estontecon en kontraŭaj direktoj kaj lasis infinitan malplenon inter ili: per tio estis kreitaj la spaco kaj la tempo, kiujn ni havas nun. La ĝemo, tiu sensona infinito, ekbatis en la estintecon, kiu ĝin krude transpuŝis for de si, kaj do la ĝemo estis pafita en la estontecon, kiu ĝin krude transpuŝis for de si. La estanteco, koliziita inter du fulmomovoj, komencis rondiri, roondiri, rooondiri, ĝis ĝi fariĝis solida kaj ronda post tiaj tro multaj turniĝoj kaj vorticoj, kaj plu kaj plu rondiris.

En la unua momento Deino pensis, ke ŝi pensas. Por mia nuna geleganto, penso estas interna vorto, interna parolo, nek videblaj nek aŭdeblaj, sed por ŝi penso estis, estas kaj estos ĉiea vorto kaj ĉiea parolo en ĉiama tempo kaj sur ĉiama spaco... Kiam ŝi konsciiĝis, ke ŝi ne pensas, sed mem vidas, ŝi ekkriis, kaj tion mi de nun tradukas per miaj vortoj:

- Kio estas tio? Ĝis nun mi vidis nenion, ĉar mi estis ĉiam ĉie, kaj do estis neeble rigardi aliloken... Mi ĝuste kaj perfekte aŭdis kaj ĝia bruo ŝajnis pensi al mi: mon do... mon do... mon do... Tiel ĝi sonis al miaj oreloj!

Deino ridis, kaj tio estis la unua fojo, kiam ŝi ridis. Al la solida kaj ronda rezulto de la turniĝoj kaj vorticoj ŝi do diris, kaj nun mi respektas ŝian lingvon:

- Mo doná a vo la nome Mondo.

Kaj la mondo estis nomata mondo, kaj la rido eksplodis super ĝi per miriadoj da floroj, kiuj falis sur la grundon kaj dissemis siajn semojn sur la tuta tero, kaj la semoj ekĝemis, kiam ili ekĝermis.

Kaj Deino diris:

- Mia penso estas kreopova. Mi vidu, kio naskiĝos el tiuj semoj.

En tia maniero naskiĝis la herboj!

La soleco denove pezis ĉie kaj ĉiam interne kaj ekstere de Deino, kaj ŝi provis pensi al la floroj de la mondo, sed ili ne repensis al ŝi. Nur en tiu momento Deino konsciis, ke ŝi estas ĉiopova, kaj tial ŝi povas krei estaĵon, kiu povu repensi al ŝi. Ŝi do pensis profundan penson, kiu tremigas la tutan mondon:

- Ho mo!

Kaj aperis estaĵo, kaj Deino demandis lin:

- Ko vo está?

Rapida respondo venis:

- Homo mo está!

Deino komprenis, ke ŝia kreito prenis al si la ekkrion, kiu lin kreis: la onomatopeo *ho mo* sin turnis en la vorton *homo*. Ŝi do ne plu volis nomi sin mem per tiu kriero, kaj do ekpensis:

- Ho mi!...

La kreito pruvis sian kapablon lerni:

- Mi estas homo.

Deino respondis bene kaj serene:

- Vi estas homo kaj virino!

Deino nomis ŝin virino nur pro tio, ke ŝi volas, ke ŝi havu duonon de ŝia potenco kaj duonon de ŝia beleco, kiuj kuniĝos en unuonon. Deino kaj Virino volis esti feliĉaj ĉie en la tempo kaj en la spaco kaj ĉiam en la tempo kaj en la spaco, sed la virino komencis senti sin kiel ŝia Deino. Kaj do la virino de Deino pensis mem al ŝi:

- Mi estas sola! Mi pensis al la floroj, kaj ili ne respondis. Mi pensis al la herboj, kaj ili ne respondis. Plej honte, kiam mi pensas per la buŝo, la folioj de la herboj kuras for, sed revenas, ĉar ilin tenas la tigoj. Mi similas al Deino: penso estas forto! Se mi pensas, mia penso forpuŝas trovatan baron, kaj se mi ĉesas pensi, la trovita baro revenas al sia loko...

Deino ridis:

- Ho pensi per la buŝo! Ni devas havi nomon por tio. Prefere du nomoj, ĉar kio abundas, tio fekundas... Kaj do: diri kaj paroli.

Kaj ŝi turnis sin al sia kreito:

- Vi parolas multon, kaj diras nenion...

Kaj ŝi respondis:

- Mi estas sola.

Deino do diris al ŝi:

- Manĝu frukton el tiu arbo, kaj vi sonĝos, kaj via sonĝo rompos vian solecon.

Ŝi parolis, kaj ŝi faris.

Ŝi ekdormis tuj per profunda dormo, kiun trakuris bildoj de plonĝoj kaj de ronĝoj kaj de sonĝoj en alfabeta ordo. En tiu sama tempo Deino dividis la virinon en du partojn: de la alto de la kapo al la alto de la kruroj. Per unu el ili ŝi unue rekonstruis la virinon kaj per la dua el ili ŝi konstruis alian similan kaj malsimilan estaĵon, evidente ne per la sama majstreco.

Kaj ŝi diris al sia nova kreito:

- Ĉar vi estas nur duono de virino, mi nomas vin Vir!

Per tio Deino senigis la novan kreiton de la deineco, kiun de la komenco la virino posedadis!


La nova kreito tamen ne manĝis el la arbo kaj do subite vekiĝis pli frue, kaj demandis:

- Kio estas tio apud mi?

Deino respondis:

- Tio estas virino, kies duono naskis vin, kaj de nun ŝia unuono post kontaktiĝo kun vi naskos alian jen similan al si kaj jen similan al vi.

La nova kreito estis pli scivola ol la malnova:



Viro kaj Virino, fotita de JJS surloke, sub honora permeso de Deino kaj de Geraldo.

- Kaj mi, kio mi estas?

Deino ĝentile respondis:

- Vi estas homo kaj vir.

Kaj la nova kreito denove demandis:

- Kial vir?

Kaj Deino bonhumore respondis:

- Ĉar vi estas duono de virino.

Kaj tio tute ne plaĉis al li, kaj li volis veki la virinon por peti klarigon, sed Deino evitis tiun unuan kvereleton inter unu kaj alia:

- Haltu!

- Pro vi, Deino! Almenaŭ permesu, ke mi estus du trionoj de la virino.

- Mi permesas! Vi do de nun estas viro!

Deino iris al siaj aliaj interesoj, ĉar ŝi ne plu estis interesata pri la paro, aŭ volis restigi ilin solaj, kaj ŝi do lasis la viron kaj la virinon kun iliaj novaj interesoj, ĉar ŝi kaj li estis pli kaj plu interinteresataj...

La tempoj komencis flui kaj flugi, kaj jam estis en la mondo multaj homoj. Deino do diris de si al si mem:

- Jam temp´ está...

Ni tamen lasu for ŝian lingvon, kaj prenu la nun ekologie verdan:

- Jam estas tempo iri al la mondo kaj vidi, kio okazas al la virino, kiun mi kreis post la mondo, post la floroj kaj post la herboj, kaj al la viro, kiun mi kreis post la mondo, post la floroj, post la herboj kaj post la virino: restaĵo de poto...

Al Deino penso estas ago, kaj ago estas faritaĵo. Ŝi do sin kaŝis post nubo, kaj rigardis malsupren. La rigardoj de Deino falis en densa lavango, kiu ekfalis, kaj ŝi tuj donis al ĝi nomon:

- Pluvo! La ĉielo pluvas sur la nubon, kaj la nubo pluvas sur la teron...


Kaj ŝi vidis, ke estas nun tre multaj homoj: granda nombro da virinoj kaj preskaŭ egala nombro da viroj. Ili tamen estis pli altaj, kaj estis pli fortaj ol la virinoj, kaj eĉ vere sin pensis pli inteligentaj ol la virinoj. Kia senbaza fiereco, Deino pensis!

La tute nudaj viroj rigardis al la minaco de la ĉielo kaj eskapis en kavernon. La virinoj, kiuj havas pli da instinkto ol la viroj, mokis la forkuron de la viroj, restis tute nudaj en la sama loko, kaj subite konsciiĝis, ke la nubo kovras Deinon, ĉar certe eĉ ŝi timas la virojn kaj do sin kaŝis post la nubo... Ili do kuris sub la nubon, kaj kriploris kaj plorkriis kun la leviĝintaj brakoj de siaj nudaj korpoj:

- Ho Deino, nia patrino! Savu nin de nia mizera vivo. La viroj, kiujn vi faris el nia praduono, estas pli altaj, kaj estas pli fortaj ol ni, kaj eĉ vere sin pensas pli inteligentaj ol ni. Ili subpremas nin, trenas nin je la haroj en la kavernojn, kaj sin sentas niaj posedantoj. Ili...

- Sufiĉe, miaj filinoj! Mi aŭdas vin, kaj savos vin.

Al Deino penso estas ago, kaj ago estas faritaĵo. Ŝi do pensis, kaj ŝia penso en la sama momento kreis la vintron kaj la arbojn, tiujn nudajn skeletojn kun la nudaj branĉoj supren al la ĉielo en muta preĝo. Kaj la virinoj preĝantaj kun leviĝintaj brakoj fariĝis do arboj kun leviĝintaj branĉoj...



La fotisto JJS enŝteliĝis malantaŭ dika praarbo por preni la foton. Tio kostis al li nerakonteblajn punojn, kiam la amazonoj trovis lin.

En la mondo restis la viroj. Kaj la viroj vivis siajn pli ol metuŝelaĥajn vivojn, kaj post kelkaj miloj da jaroj unu post alia fariĝis polvoj sur la grundo, kiujn dislevis la movoj de la malaltaj branĉoj per senmemora venĝo. Sur la tuta mondo restis nur vegetaĵa vivo, verde verda, ekologie verda: en verda, ne blua mondo!

Kaj tiam multaj el la arboj fariĝis virinoj, kaj ilia Eva estis Amazono en la tiama senmaskla homaro: per partenogenezo, ŝi naskis du infanojn, nomatajn Hapelo, la unua, kaj Gaino, la dua. Neniun el iIi ŝi timas pro la alloga forteco de la ama zono de siaj fratinoj…

Kaj ŝia…

*En karavelo esperantisma...*



# Ĉu vi palindromas?

### de Paulo Sérgio Viana

Ne, kara leganto, ne temas pri nova lingvo aŭ malsano, aŭ nova speco de gimnastiko. Palindromo estas kurioza, antikva, defia vort- aŭ frazludo. "Pali" signifas en la helena lingvo "ripete", aŭ "laŭ inversa ordo". Palindromo estas do vorto aŭ frazo legebla laŭ inversa direkto. Kompreneble, oni povas utiligi samon por ciferoj, ekzemple 1991, sed en matematiko la afero aspektas iom banala. Ne tiel, kiam temas pri vortoj aŭ frazoj.

Oni bone distingu palindromon disde anagramo. En ĉi tiu lasta, oni simple rearanĝas la literojn en alia ordo, por formi novan vorton aŭ frazon. Ekzemple: Belisa/Isabel; Soares Guiamor/Guimarães Rosa; Iracema/America.

Ĉe palindromoj la afero estas pli malfacila, tiel ke la defio allogis homojn de antikva tempo. Ju pli longa la frazo, des pli valora. Fama palindromo, ŝajne devenanta de antikva Romo estas ĉi tiu ĉarma latina frazo:

"SATOR AREPO TENET OPERA ROTAS." (="Semisto Arepo tenas radojn en laboro.")

Kurioze, oni aranĝis ĝin en perfekte simetria kvadrato, legebla ĉiudirekte, kiel legeblas ĉitie flanke.

R O T A S
O P E R A
T E N E T
A R E P O
S A T O R

En ĉiu lingvo oni trovas palindromojn:

En la portugala:

"AMENO FONEMA"

"SOCORRAM-ME, SUBI NO ÔNIBUS EM MARROCOS."

En la hispana:

"ADÁN NO CALLA CON NADA."

"ADÁN NO CEDE CON EVA Y YAVÉ NO CEDE CON NADA."

"A MAMÁ ROMA LE AVIVA EL AMOR A PAPÁ Y A PAPÁ ROMA LE AVIVA EL AMOR A MAMÁ".

En la angla:

"A MAN, A PLAN, A CANAL, PANAMA."

"MADAM I'AM ADAM."

En la itala:

"ARES, È SERA!"

"ACAVALLA DENARI, TIRANE DALLA VACCA."

En Esperanto:

"NE MATENO, BONE TAMEN."

"LA VEDO CELAS: NE MALSATAS LAM' EN SALECO DE VAL'."

Fine, jen eta kontribuo fare de la kompilinto mem:

"ONI VOLAS: OVO, SALO, VINO."

Jen la defio, leganto. Palindromu vi mem en esperanto, kaj sendu vian kontribuaĵon al la redaktejo de La Karavelo, lakaravelo@gmail.com , al la atento de la asistanto pri palindromoj, Paulo Sérgio Viana.

*En karavelo esperantisma...*



# La ribela abelo

**de Luiza Carol**

***Putrado de fiŝo komenciĝas de la kapo***



Iam, delonge, en malproksima lando, staris abelujo enhavanta malgajan abelaron. Malkontentaj estis ĉiuj laboristaj abeloj loĝantaj tie, ĉar ege malfacile perlaboris ili sian mielon. Ekde la unuaj sunradioj ĝis la sunsubiro la abeloj laboregis, sed la abelujo ĉiam estis malriĉa, kaj la larvoj ploradis pro malsato. La reĝino admonadis la abelojn, igis ilin labori pli kaj pli multe, ĝis granda parto de ili mortis pro laco. Tamen, la abelujo daŭre estis malriĉa, kaj la larvetoj daŭre ploradis pro malsato en siaj luliloj.

Iun tagon, diligenta kaj laborema abelo ribelis. Ŝi iris al la reĝino kaj kuraĝe alparolis ŝin:

- Kial nia vivo estas tiel mizera? Kien foriras nia mielo?

La reĝino ekploris kaj ekplendis:

- Kion mi povus fari? La abelisto venas, kaj prenas perforte preskaŭ tutan nian mielon!

Ekkoleris la ribela abelo. Iris ŝi al la abelisto kaj severe demandis:

- Kial nia vivo estas tiel mizera? Kien foriras nia mielo?

La abelisto suspiris kaj ekplendis:

- Kion mi povus fari? La ministro pri agrokulturo postulas tiom grandajn impostojn de la kamparanoj, ke apenaŭ povas ni manĝigi niajn infanojn!

La kolero de la ribela abelo kreskis. Ŝi iris al la ministro pri agrokulturo kaj kriis al li:

- Kial nia vivo estas tiel mizera? Kien foriras nia mielo?

Sed la ministro malgaje plendis:

- Kion mi povus fari? La kruela diktatoro de tiu ĉi lando postulas pli kaj pli multajn riĉaĵojn...

Tiam la ribela abelo iris al la diktatoro. Kiam tiu estis dormetanta sur mola seĝo, la abelo kriis ĝuste apud lia orelo:

- Kial nia vivo estas tiel mizera? Kien foriras nia mielo?

La diktatoro vekiĝis subite kaj nerveziĝis.

- Kio okazas? Kiu kuraĝas ĝeni min dum mia ripozo?

- Estas mi, laborista abelo. Respondu al mi! Kien foriras nia mielo?

- Kiu? Abelo? Eta abelo? Ha, ha! Hi, hi! Aroganta abelo! Kiel vi kuraĝas alparoli min? Hej, servistoj! Tuj mortigu tiun ĉi arogantulon! Ha, ha! Hi, hi! Ha, ha!


La abelo eniris la buŝon de la diktatoro profunde, kaj pikis lin je la radiko de la lango.

Mortis la abelo. Ŝvelis la lango de la diktatoro, kaj li mortis.

La posteulo de tiu diktatoro estis malpli avida kaj malpli stulta homo. Li plibonigis la vivmanieron de la tuta lando. Iom post iom, eĉ en la abelujo de la ribela abelo, la malgajeco kaj la malkontento foriris.

---

*El la nederlanda florado...*



# Pisofloro

*(flandre: Pisseblommen)*

***de Guido Gezelle, 1891***
*trad. Leo De Cooman, el la flandra*

***Leontodo (latine: taraxacum officinale), pro ĝia diuretika efiko, estas ankaŭ nomata en nia regiono "pisofloro". Jen ŝerceta poemo.***



La veter' estas luma kaj dolĉe varmeta
  kiel okazas ne ĉiutage.
Lasu min en verdajn ejojn
  konduki vin per la mano.
Al vi floreton mi vidigos
  de temp' al tempo
min permesu vin paroli,
  pri la ecoj de la floro.
La floreto, kiun mi plej ŝatas
  kaj ĉiam pleje mi ŝatos,
tiom longe ol ĝi floros,
  jen malsupre ili kreskas
je nivelo de la tero,
  decan foliaron disvolvante,
verdaĵon ĝian oni vidas
  nur apude, ne de fore.

Ĉu vi volas scii ĝian nomon?
  Estas - kun permeso - pisofloro.

*En karavelo esperantisma...*

# Joĉjo kaj Johano

**de João José Santos**

Joĉjo estis tiam liceano. Li kursis la dekan lernjaron kaj estis elektinta la studadon de beletro. La lingvoj lin ravis. Post la lernado de la portugala, la angla kaj la franca, tiam li ekstudis la germanan. "Kiel bela, forta kaj regula estas ĉi tiu lingvo!" Pensis li. Kvankam lia intenco estis la ekstudo de la latina kaj de la helena en la deka jaro, li devis rezigni pri tio, ĉar lia lernejo ne ofertis tiujn fakojn. La germana aperis kiel dua elekto, sed rapide li enpasiiĝis al tiu lingvo. La instruisto, olda sinjorino jam alkutimiĝinta aŭskulti la plendojn de la junuloj, laŭ kiuj la germana estas tre malfacila kaj plena je gramatikaj reguloj, gajnis novan vivon, rejuniĝis, en kontakto kun tiu junulo kiu studis gramatikon kun la plezuro de tiu kiu ludas sian preferatan ludon. La portugala lingvo estis plej agrable manovrita de Joĉjo, kaj la francan kaj la anglan li daŭre studis diligente. La aliaj fakoj ne tiom multe plaĉis al Joĉjo, kiu lernis matematikon nur pro lerniga devo. La deka lernjaro finiĝis, kaj Joĉjo informis la patron kaj la patrinon pri siaj taksociferoj kiuj plej impresis kaj fierigis la gepatrojn de la junulo.


William Bouguereau, Amoro kun papilio, (1888).

Venis la granda feriado. En julio, aŭgusto kaj ĝis la mezo de septembro, la lernantoj ferias en Portugalio. En tiu somero, Joĉjo deksesjariĝis. Invite de la banko kie la patrino laboris, Joĉjo profitis la oportunon por pasigi dekkvin tagojn en ferikampo en sia lando. Tien aliris aliaj du dekoj da gejunuloj elvenintaj el diversaj eŭropaj landoj. Unu el la junulinoj, samaĝa kiel Joĉjo, nomiĝis Helnjo, kaj elvenis el Grekio. Tiuj du geidoj de antikvaj homoj kiuj emis traŝipi ondojn, rekonis ion, unu en la alia, okule-ĉe-okule, en la unua ekrigardo. La greka junulino radilumis ravan belecon! Certe Amoro, la filo de Venuso kaj Marso, estis aŭtomate magnetita al la sceno, kaj tuj lerte ekpafis sagon, kiu trafe trapasis kaj kunligis la koron de la helenidino kun la koro de la luzido. Tiuj du semajnoj en la ferikampo fariĝis mieltempo por tiuj idoj de la maro. La junulo estis fariĝinta alta, muskoloza, kaj havis ian profundon en la mielbruna rigardado, kiu katenis ne rezisteble la junulinon. Nokte Johano sonĝis pri ŝi, tage li revis pro ŝi. Ŝia beleco estis ekzota, ŝia rigardo dolĉa kaj blua kiel la akvoj de Mediteraneo. Kune ili malkovris multajn amorajn ludojn al kiuj ili alkuris ĉiam kiam la monitoroj distriĝis el sia atentado.


Munch, Apartigo, (1900).

La tempo pasis, kaj la adiaŭo estis plej korŝira. Ambaŭ ploris sen rezignacio pro la apartiĝo, plene ĉagrenitaj, en la brakoj unu de la alia, despere tristaj...

Pasis la tagoj. En Ateno, la fraŭlino depresis kaj sin lasis tag-post-tage en la lito. En Lisbono, la fraŭlo furiozis malbenante sian sorton, elspezante ĉiujn moneretojn por telefonvokoj al Ateno, kiuj pli kaj pli malfeliĉigis lin, ĉar ŝi multe pli rapide ol li ekmildigis sian pasion.

Venis la mezo de septembro, kaj la lecionoj rekomenciĝis. Johano obstine ne forgesis la grekan fraŭlinon. Post unu monato, ŝi informis lin telefone ke ŝi ekflirtis kun kolego. Johano ribelis, malbenis sian vivon, kaj sin demandis kial li ne rajtas je la pluo de sia amo, li kiu kapablus esti fidela al tiu fraŭlino por la eterneco. Ne studis Johano en tiu jaro. La instruistoj apenaŭ rekonis lin. La junulo kiu pasintjare filozofiis pri la ekzisto, kiu polemikis pri la portugala literaturo, kiu enprofundiĝis en la lingvaj studoj, ne plu studis, prifajfis ĉion. La fraŭlo kiu vestiĝis per blanka ĉemizo, kaj sin kondutis plej elegante, tiam vestiĝis per nigraj t-ĉemizoj. La fraŭlo kiu aŭskultis "Beatles" kaj diskutis pri klasika muziko, tiam aŭskultis metalan muzikon. La mondo ruiniĝis por Johano. La gepatroj provis helpi lin, per diversaj manieroj, sensukcese, kaj la instruistoj tute ne komprenis la ŝanĝon de la junulo.

Venis la feriado kaj venis alia lernjaro, la dekdua, la lasta antaŭ la universitato. La vivo de Johano estis la sama: manko de disciplino kaj organizo, prifajfo al la studoj, nigraj t-ĉemizoj kaj metala muziko. La jaro finiĝis kaj Johano eniris la universitaton. Aliaj birdinoj ekkantis por li, kaj la tempo helpis la kuracon de la profunda vundo farita de la filo de Venuso kaj Marso. Iom post iom, li reprenis la antaŭan studkapablon kaj organizon, fariĝante responsa, atenta kaj esplorema studento.

Nun Johano estas juna viro, alta, forta kaj eleganta. Li estas afabla homo, kiu kondutas ĝentile al ĉiuj, ĉefe al oldulinoj kaj infanoj, por kiuj li havas infinitan paciencon. Lia voĉo havas

seriozan kaj agrablan tonon, kaj lia kulturo kaptas la atenton de belaj virinoj, kio tre plaĉas al li. La amikoj aŭskultas lin kiel oni aŭskultas afablan konsiliston.

Hieraŭ vespere, Johano vizitis min. Antaŭ du semajnoj, mi ne vidis mian karan filon. Ni brakumis nin forte, kisis niajn vangojn, okulis en la okuloj unu de la alia funde, kiel kutime, kaj mi karesis lian kapon kun pleja dorloto, ĉar por mi li estas mia eterna bebo. Ni parolis longe, post kafo kaj viskio. Dum horoj, ni parolis pri Kamonio kaj Pesoo, pri Kafka kaj Orwell, pri literaturaj teorioj kaj filozofioj, kiel ni ŝatas fari kiam ni renkontiĝas. Mia Joĉjo parolas nun pri verkistoj kiujn mi neniam legis. Mi aŭskultas lin kaj li aŭskultas min, ambaŭ plej atente, ambaŭ plej respekte, ambaŭ plej plaĉe.

Postkiam li enlitiĝis, mi restis iom pli sidanta sur la sofo, sola kun miaj fantomoj, ankoraŭ postĝuante la konversacion kun mia Joĉjo. Mi pensadis trinkante tiam odorriĉan princan teon. Rigardis mi eksteren kaj rimarkis, ke enorma plenluno superverŝis arĝentan lumon sur Lisbonon. Mi pensadis kaj retropensis, pasis la tempo, rigardis mi la lunon, kaj tiam miaj okuloj pleniĝis je arĝentaj larmoj, kiuj banis mian veon pro la pasinta ĉagreno de mia filo. Tiam mi preskaŭ saŭdadis tiun grekinon, kiun mi neniam vidis, sed kiun mi povus akcepti kiel filinon.

---

## Ĉu vi memoras

***de nekonata aŭtoro,***
*el la ukraina*

Ĉu vi memoras tiun printempon belan
kaj la alaŭdan kanton subĉielan,
kiam mi flustris al vi tiam:
Mi amas nur vin kaj forlasos neniam?

La ruĝblankaj floretoj
sur teron el ĉerizujo faladis
kaj nur luno kun steletoj
nin el ĉielo rigardadis.

Vi diris min kvazaŭ kun amara ploro:
Mia beleco, kiel la ĉeriza floro
ankaŭ simile iam forfloros
kaj malaperos, kiel la ros'.

La ĉerizujo nun ne floras
kaj alaŭdkantoj ne sonoras,
sed vi kia por mi estis,
tamen sama ĝis nun restis.



*Polio, kaj ne nur, poezias...*

*trad. Edward Jaśkiewicz*

## Atendis mi vin hieraŭ

***de Jan Kasprowicz***

Atendis mi vin hieraŭ
de l' maten'  ĝis matenfino,
sed trompis min ebrisopiro
pro am' al vi karulino.

Plu vin mi atendos neniam,
en koler' ĵuri mi provis,
sed por anim' propra nun mi jam
mensogi eĉ iom ne povis.

Do diros mi simple, sincere
mirinda mia, amata:
Ke - eĉ tra centjaroj - vi vere
plu estos de mi atendata.

Ho! Kion fari mizero,
se ne atendi ĝis fino?
Ja vi sunsubir' sur tero,
mia sunleviĝ', destino!



Annie Louise Swynnerton, Eroso kaj Psiko, (1891).

## Se vi estus

***de Kazimierz Przerwa Tetmajer***

Se l' profund-lago vi estus – kara,
mi ĝin rigardus eĉ ĝis vivfino:
se ankaŭ estus vi l' bru' arbara,
ĝin mi aŭskultus en rav', fascino:
kaj se vi estus l' ermitej' ĉela,
por vi rezignus mi pri volupto;
se vi la morto estus, ho, bela!
Al vi mi irus, kiel al nupto.



*Egon Schiele, Brakumo - Amantoj 2, (1917).*

*En karavelo esperantisma...*



# Diboĉeta esperanto-renkontiĝo

**de Valentin Melnikov**

Ni ĉiuj scias, ke Esperanto donas multajn eblecojn por vivi interese. Agrablas poste rememori vizititajn lokojn kaj renkontitajn samideanojn. Sed foje aperas tiaj cirkonstancoj, ke impresoj sufiĉas por multaj jaroj de esperantista vivo, kaj ordinara homo eĉ ne imagas ion similan. Por tio oni eĉ ne bezonas veturi eksterlanden – en USSR tio tutegale nerealis...

Ĉio priskribita estas pura vero, la eventoj reale okazis dum nur kelkaj tagoj, kaj la impresoj ne paliĝis post preskaŭ dudek jaroj en memoro...

En la 1980-aj jaroj, Uralo estis plej aktiva en sovetia Esperanto-movado. Ĉiusomere esperantistoj venadis al unu el la uralaj urboj por tradicia aranĝo: komence tio estis kvartaga Forumo, poste Semajno, fine – Dekado. Amikiĝinte kun uralanoj dum BET en Tallinn-1988 (tie mi estis fakte la sola "eksterulo", kiu vizitadis iliajn programerojn), mi certe emis viziti ilian "neston". Do jen, en 1989 okazis la 6-a Dekado...

Mi anticipe avertis pri mia intenco veni – kaj ricevis gravan komision renkonti en Moskvo kaj akompani al Permj du eksterlandajn gastojn. Polo Ryszard ne venis, ĉar ĝuste tiam en Pollando ekis io simila al ŝtat-renverso. Vilmos, la ĉefredaktoro de "Hungara Vivo", firme promesis veni, sed necesis trakti konkretaĵojn. Mi kelkfoje provis telefoni al Budapeŝto (por Sovetio jam tio estis ekzotaĵo!), sed ne sukcesis lin kapti. Mia labortago tiam komenciĝis tre frue, je la 6-a matene mi jam vekiĝis – do reprovis telefoni. En Budapeŝto estis la 4-a horo de mateno, ĉiuj certe estas hejme... Virina voĉo diris ion nekompreneblan. Mi despere-aŭdace tuj eligis mian tutan scion de la hungara lingvo: "Nem tudom magyar!" ("mi ne komprenas hungare!") Klare prononcis: "Vilmos Benczik! Esperanto!" – kaj aŭdis responde: "Momenton!" Do ĉio ordiĝis.

Post kelkaj tagoj mi tagmeze renkontis la kolegon en flughaveno, kaj vespere ni ekveturis trajne al Permj. Mi planis veni unu tagon antaŭ komenco de la Dekado, por trankvile loĝiĝi, adaptiĝi ktp. Sed la aventuroj nur komenciĝis...

Meze de la vojo, nia trajno haltis. Nur post kelkaj horoj ni eksciis, ke ie proksime ebria traktoristo aŭ kamionisto kaŭzis kolizion kun ŝarĝtrajno. Ĉiuj trajnoj haltis dum diurno, atendante finon de fervoj-riparo. Bone, ke mi laŭ sovetia kutimo havis pli ol sufiĉan provizon da manĝaĵoj...

Ni venis rekte al la programkunsido, kaj nur vespere, kun kelkaj aliaj partoprenantoj, trafis la loĝejon de Nikolaj. Ĉio ŝajne trankviliĝis kaj ordiĝis. Jes, ŝajne. Vilmos jam anticipe promesis alporti donace al la loka klubo tri videokasedojn kun filmoj dublitaj en Esperanto. Spektado de la filmoj jam estis enskribita en la programo.



Egon Schiele,
Nuda staranta virino,
(1912)

Do jen Vilmos komencis malpaki la valizon: elmetis unu kasedon, poste la duan, la trian... fine li elprenis la kvaran, kaj sur lia vizaĝo trakuris ĉiuj imageblaj kaj neimageblaj emocioj: teruriĝo kaj feliĉo pro saviĝo el subita mortodanĝero. Evidentiĝis, ke la kvara kasedo estas kruda pornaĵo, kiun lia edzino enmetis erare, kaj li mem eĉ ne sciis pri tio! Feliĉe, limgardistoj ne trovis la "kontrabandan" kasedon. Kompreneble li ne riskus porti ĝin reen, do donacis ankaŭ ĝin. Ni ĉiuj tuj ĥore diris: ni volas tion spekti! Vilmos sincere diris, ke tie estas nenio interesa, sed ni obstinis. (Nu jes, ja seksumado en USSR ne estis... eĉ tiu frazo ankoraŭ ne famiĝis.) La programo jam estis plenplena – vere, mi neniam spertis tiom streĉitan programon de E-aranĝo: nur fine de la kvina tago mi sukcesis trovi iomete da libera tempo por rigardi en la urbo tion, kio interesis min. La neplanita programero tamen okazis – pri tio mi rakontos iom poste...

La unua freneza tago finiĝis. Honora hungara gasto, certe, ricevis apartan ĉambron. La ceteraj lokiĝis, kiel povis. Mi dormis surplanke sub granda manĝotablo, kun nur la kapo ekstere por normale spiri. Frumatene mi vekiĝis pro tio, ke iu, irante al necesejo, surpaŝis mian kapon...

La programo, mi jam diris, estis riĉega. Prelegoj, koncertoj, "rondaj tabloj", spektado de jam menciitaj filmoj... Ankaŭ renkontiĝo de aŭtoroj kaj redaktoroj de E-gazetaro kun legantoj. Sed aperis la obstaklo: ***ĉiuj*** ĉeestantoj iam ion verkis kaj/aŭ redaktis. Tamen fine unu simpla leganto, Firdaus, troviĝis, estis honorigita, kaj la renkontiĝo sukcesis.


Okazis interesa prelego pri poezia tekniko, ĉefe laŭ konataj verkoj de Kalocsay – pri diversaj rimspecoj: agordoj, adasismoj... Fine la prelegintо proponis fari demandojn. Iu seriozmiene demandis: kiu speco de rimo – ĉu lama, ĉu aborta, ĉu asonanca – estas inter la vortoj "merdo" kaj respektiva rusa vorto "der(j)mo'" (signifanta precize la samon). Respondo ne sonis kaj apenaŭ bezonatis, post tio aliaj demandoj jam ne aperis...

Intercetere en la programo estis elpaŝo de iu folkloristo – kun popolkantetoj (ofte treege maldecaj – niaj knabinoj foriris en apudan ĉambron kaj ŝajnigis ne aŭdi ĉion ĉi) kaj rakontoj pri iamaj moroj, aparte pri la influo de la socialisma revolucio al tiuj. Elstaris la rakonto pri tuj-postrevoluciaj edziĝfestoj: se la fianĉino estis virga, do feliĉa novedzo matene pendigis super la domo ruĝan flagon!

Sekvamatene ni, kiel ĉiam, iris al la kongresejo, situanta samplace kun la domo de la urba Partia Komitato. Super la Komitato, kiel ĉiam, flirtis la ŝtata flago de Rusia Federacio. Se iu forgesis: tiam ĝi egalis al ruĝa flago de Sovetunio kun aldona helblua strio. Iu el ni mediteme diris kvazaŭ al si mem: "Do, la fianĉino estis virga!" Iu alia rimarkis: sed tie ja ankoraŭ estas helblua strio, kion do signifas ĉio kune? Oni ne kuraĝis eldiri supozojn publike... ("helblua" ruslingve havas la kromsignifon "geja").

Ni ne ĉiam sidis en ĉambroj: okazis bonegaj ekskursoj en Kungura kaverno, laŭ Siberia Landvojo, en subĉiela muzeo de iama vilaĝa vivo ktp. Kaj Vilmos eĉ estis invitita al iu renkontiĝo de komiaj lingvistoj en Kudimkar, ĉefurbo de komi-permia regiono (ja la komia lingvo parencas al la hungara). Li flugis tien per fama aviadilo AN-2: projektita en 1940-aj jaroj, kun duoblaj flugiloj, unusola brueganta motoro kaj lignaj benkoj interne. Certe Vilmos kiel eŭropano ricevis unikajn impresojn...

Rapide pasis planita semajno en Permj, vespere ĉiuj estis veturontaj al Sverdlovsk por la lastaj tri tagoj de la Dekado. Kelkaj horoj posttagmeze estis liberaj – ni decidis ne perdi ilin vane kaj spekti la pornokasedon. Amikoj de Nikolaj alportis en lian loĝejon necesan aparataron. Deko da homoj plenigis la ĉambron kaj streĉe rigardadis figurojn sur la ekrano. Sola problemo: ĝis la trajno restis malpli ol du horoj, sed la vidbendo havis kvarhoran daŭron! Vilmos ne trompis, la scenoj similis unu la alian kaj baldaŭ enuigis – post kelkaj minutoj ni, "kaptinte la esencon", movis la bendon rapide antaŭen, spektis novan pecon, poste denove antaŭen ktp. Kiam la bendo finiĝis, ĝis la trajno restis ne pli ol 15 minutoj. Ni kaptis la aĵojn kaj ekkuris al tramhaltejo. Jam en tramo Aleksander konstatis, ke li forgesis en la loĝejo de Nikolaj sian tekon kun ĉiuj materialoj por la sverdlovska parto de la Dekado. Triopo elsaltis el la tramo kaj kuris al la loĝejo, dum ni veturis plu. De la fina tramhaltejo ĝis la stacidomo estas kelkcent metroj – mi preskaŭ kuris tiun distancon kun pezaj sakoj en ambaŭ manoj, dispuŝante la homamason. Jen nia vagono, la ŝtupetaro jam estas fermita. Mi kriis, petante enlasi min, kaj poste maltrankvile rigardis eksteren, observante la kunulojn (konduktorino jam refermis la ŝtupetaron). Jen la homoj alkuras – mi mem malfermas kaj, flankenmovinte la konduktorinon, prenas valizojn per ambaŭ manoj alterne kaj ĵetas ilin transkapen en vagonkoridoron. Fine ĉiuj estas ene, la trajno malrapide ekveturis... kaj kiam nia vagono treniĝis preter tunela elirejo – de tie elkuris la restinta triopo. Jen ankaŭ ili ensaltis en la vagonon. Eblas respiri. Poste Aleksander rakontis: ili kaptis privatan aŭton; la ŝoforo, kompreninte la situacion, deklaris la prezon: dek rubloj plus po unu rublo por ĉiu ruĝa trafiklumo, kiun li ignoros (kontraŭ tiama rublo oni povis sate tagmanĝi). Ili sukcesis...


Guido Reni, Drinkanta Bako, (ĉ.1623)

En Sverdlovsk, Aleksander, kun sia edzino Halina kaj la fileto, luis bonan loĝejon urborande, tamen ofte li noktumis en uzina komunloĝejo eksterurbe. Mi devis noktumi tie. Tiuvespere plejparto de la publiko festenis en restoracio, min tio ne interesis – do ni interkonsentis renkontiĝi en lasta vagono de apudurba elektrotrajno, startonta iom antaŭ noktomezo. Mi tamen ekhavis ian senton de malcerteco – do por ajna okazo demandis Halina-n pri preciza adreso kaj vojo. "La antaŭsentoj lin ne trompis", kiel tekstas konata parodio... En la trajno samideanoj ne estis. Mi eliris ĉe ĝusta stacio, laŭ priskribo trovis la vojon – lanternoj ne lumis –, eniris ĝustan domon, preskaŭ palpe supreniris al la tria etaĝo (ankaŭ ĉe la ŝtuparo regis plena mallumo) kaj frapis loĝejpordon. Malfermis nekonata persono, al mia demando pri Aleksander, li kun malcerteco respondis: "ŝajne, li hodiaŭ intencis noktumi en la urbo..." Kion fari? Jam estas noktomezo, lasta trajno foriris, mi neniun konas ĉi tie kaj tutegale ne havas alian lokon por noktumo! Mi petis permeson almenaŭ sidi en la kuirejo – feliĉe oni permesis, kaj mi triste prepariĝis sidi ĝis mateno. Tamen – post kvaronhoro en la loĝejo aperis Aleksander kaj Aleksej. Jes, ili tro bone

sidis en la restoracio, malfruis al la trajno kaj kaptis taksion. Ĉu "fino bona – ĉio bona"? Hm, se estus tiel...

Aleksander estis en relative normala stato, sed Aleksej suferis pro ebriego. Li alterne ripetadis du frazojn: ke li tuj ĉiujn fikos kaj bugros (tion timi ne indis – li ja estis tro ebria), kaj – ke li tre malbonfartas, do tuj vomos. Jen tiu danĝero estis reala, kaj se li vere vomus, en la ĉambreto restus nenia pura loko, ne estus ŝanco por saviĝo. Inter du faldlitoj kaj pluraj librobretoj apenaŭ eblis moviĝi...

Ni iel sukcesis malvesti Aleksejon kaj li tuj ekdormis. Sed Aleksander, kiel intelektulo, deziris antaŭ dormo iom legi. Ne ian facilaĵon, sed klasikan filozofion – ŝajne, ion de Aristotelo. Mi grumblis: damne, jam estas post la unua horo de la nokto, morgaŭ necesas frue vekiĝi, ni dormu! Do ruza Aleksander subŝovis al mi faman maldecan poemon "Kojonov Luĉjo" – ĝis tiam mi ankoraŭ ne legis ĝin plene (post kelkaj jaroj mi tradukis ĝin). Estiĝis silento, dum duona horo ni kviete legis...

Frumatene ni triope iris tra arbaro al bushaltejo por reveni en la urbon. Aleksejon post hieraŭa ebrio turmentis soifego. Dumvoje li kelkfoje kun vortoj "Oj, mi altrinkos!" emis surgenuiĝi kaj trinki el flakoj, abundaj post nokta pluvo. Ni iel retenis lin – tamen en la loĝdistrikto li fine efektivigis sian deziron, trovinte rondan fermoplaton de akvodukta luko, en kies kavo restis iom da rusta akvo...

Tiutage en la programo estis jaĥta promeno tra lago. La jaĥto, aparteninta al amiko de Aleksander, estis negranda, do ne ĉiu deziranto povis partopreni – sed certe mi kaj Vilmos, kiel foraj gastoj, havis privilegion. Ni estis 10- aŭ 12-ope. La vetero sufiĉe malbonis: forta vento, grandaj ondoj – la mastro preferis ne eknavigi tuj, iom atendi. Dum duonhoro la jaĥto balanciĝis ĉe la kajo. "Sed ni kunhavis", laŭ fama humuraĵo – do tuj komencis "varmiĝi". Debordiĝis ni, jam havante sufiĉe da vaporo en la kapo...

Navigo sub velo vere impresis. Precipe la stirado: sidante triope ĉe la poŭpo, ni devis laŭ ordono de la mastro rapide transmeti la velon – ne forgesante klini kapon por eviti kontuzon per stango (ne ĉiam sukcese). Poste amikoj diris, ke ili tute teruriĝis, vidante kiel granda stango impetas al mia kapo, kaj mi iel strange kliniĝas... sed mi restis viva kaj eĉ senvunda.

Ni atingis la transan bordon. Tute proksime aperis samtipa jaĥto, kies mastro estis amiko de la nia. Nia "kapitano" fiere rakontis al li, ke li havas gaston-eksterlandanon (necesas mencii, ke Sverdlovsk longe estis "fermita" urbo, kien eksterlandanoj ne rajtis veni). Kaj ne simplan! Vilmos, sufiĉe bone parolanta ruse, rakontis okazon el sia ĵurnalista vivo:

Foje Hungarion vizitis fama komunistpartia funkciulo Jegor Ligaĉov, la aŭtoro de iam brue anoncita kaj plene fiaskinta "nutraĵprogramo". Laŭ kutimo de sovetia "pliaĝa frato" li orgojle provis instrui hungarojn, kiel necesas organizi agrokulturon kaj nutraĵ-industrion. Vilmos, ĉeestinta inter ĵurnalistoj, laŭte proponis: ni hazarde fingrotuŝu mapon de Hungario, kaj poste – de Sovetunio, poste veturu al indikitaj lokoj, eniru tieajn nutraĵvendejojn kaj komparu la sortimenton. Kaj poste faru konkludojn... Ligaĉov paliĝis, ruĝiĝis, kaj fine mansvingis, dentogrince ekkriis "Ĥvatit!" (ruse "Sufiĉas!") – kaj fuĝis. Kompatinda tradukisto longe duonbalbute diris ion kiel: "Jegor Kuzmiĉ dankas ĉiujn pro la atento, li tre bedaŭras kaj pardonpetas, ĉar ne plu povas daŭrigi la konferencon, ĉar havas gravan aferon" ktp. La najbaro de Vilmos, ne komprenanta ruse, admiris: kiom konciza kaj esprimplena estas la rusa lingvo!..

Kiu ne vivis en tiama Sovetunio – apenaŭ imagas, kiom forta tiam estis la popola amo al Boris Jelcin, posta prezidento de Rusio (des pli en ties naskiĝurbo) kaj kiom, respektive, fortis malamo al ties kontraŭulo Jegor Ligaĉov, de kiu poste en popola memoro restis, ŝajne, unusola frazo "Boris, vi ne pravas!" Do Vilmos estis akceptita kiel heroo. Tuj aperis kelkaj boteloj, kaj baldaŭ la tuta kompanio estis komplete feliĉa.


Willem van de Velde (la juna), Kalmo - Velboatoj (ĉ. 1662)

Necesis navigi reen. Vilmos-on oni prenis al la alia jaĥto. Plejparto de nia grupo, taksinte la staton de nia ŝipestro, preferis reveni ĉirkaŭvoje, perpiede kaj poste per tramo. Ni restis triope: nia "kapitano", Aleksander kaj mi. La jaĥto startis, sed preskaŭ tuj la mortebria ŝipestro falis kaj ne plu montris vivsignojn. Kion ni povis fari? Aleksander iam navigis per tia jaĥto, sed nur kiel pasaĝero; mi – unuafoje, do sperto por manipuli velon tute mankis. Baldaŭ evidentiĝis, ke la jaĥto drivas misdirekten, kaj poste ĝi trafis al malprofunda loko kaj enfiksiĝis grunde. Punkto-fino. Ebria ŝipestro dormaĉas sube, ni duope nenion povas fari. Evidente ni troviĝis en fora, nevizitata parto de la lago, neniaj boatoj videblis... Pasis eble tri horoj, jam preskaŭ vesperiĝis. Aleksander saltis en akvon (tute nuda, por ne malsekigi vestojn) kaj provis nin

iel liberigi. Mi, ne tre bone komprenante la aferojn, ion tiris, kaj la jaĥto ekflosis. Do jen, la jaĥto malrapide drivas for, kaj nuda Aleksander staras sur malprofundaĵo... Li diris, ke eĉ homoj surborde tion observis – mi tute ne memoras.

Ni drivis kelkdek metrojn laŭ nedifinita direkto. Kaj subite – hura! – jen proksimiĝas motorboato kun du nekonatoj kaj nia Vilmos. Evidentiĝis, ke la alia jaĥto sukcese reatingis la haveneton (la ŝipestro estis eble malpli ebria kaj certe pli sperta ol la nia), la uloj jam invitis Vilmos-on al si hejmen, certigante ke tie troviĝos pliaj boteloj. Tamen Vilmos, kvankam jam "bonhumora", ion rememoris kaj firme diris: ne, tie sur la lago restis miaj amikoj, sen ili mi nenien veturos!

Unu el la venintoj saltis al ni, ordigis la velon, alfiksis ŝnuregon, ĵetitan de sur motorboato – kaj ni rapide ekmoviĝis. Post kvaronhoro ni jam estis en la haveneto kaj forlasis la "gastaman" jaĥton. La mastro dum tuta tempo ne moviĝis kaj dormaĉis plu, en tia stato ni lin lasis.

Sekvan nokton mi pasigis en alia komunloĝejo, ĉe alia samideano, jam sen aventuroj.

---



*En karavelo esperantisma...*

***de Nikolaj Neĉaev***

## Valentino Melnikov naturistas

Apartenas Valentino
Al la gento senkulota,
Ĵetas l' korpon al la sino
De la maro tajde trota.

Valentino apartenas
Al la gento naturista.
Vestoj l' korpon ne katenas
En la vivo optimista.

Valentino apartenas
Al la homoj kiuj saĝas.
Je la sano l' maro benas
Valentinon. Lin ne kaĝas,

Lin ne kaĝas vesta trudo,
Sorbas l' korpo akvon, sunon
Kaj ricevas lia nudo
Sunan brunon kaj imunon.

## Mi estas pozisto

Vivo rutina la korpon katenas, sufokas,
Vivo belarta por pozi poeton alvokas.
Havas feliĉon mi nudi en frosta sezono,
Fiksas l' aspekton por arto peniko, krajono.
Sanon la korpo kun freŝa aero enspiras,
Belo poeta ĉefverki pentristojn inspiras.
Sudo edena tre foras, la mar' malapudas,
Tamen eĉ vintre sorbante junecon mi nudas.

## Beloj

Iuj diras:"krudas vivo,
Versoj viaj tro naivas".
Sed kontraste l' koro ludas
Per la rimoj, kante vivas.

Iuj pravas, vivo krudas,
Sed apude estas beloj
Kaj ilia ĝojmotivo
Eksonoras en l' oreloj.



Pierre Renoir, Juna knabo kun kato, (1868)

## Mia amikaro

Mi estas malasketo,
Min ravas versnektaro.
Aromu ĉe l' poeto
Amika poetaro.



Transmonto, Portugalio (2004), de JJS



*trad. Gerrit Berveling,*
*el la Latina*

## *Heja ho viroj!*

### *de nekonata aŭtoro (9a jc)*[1]



John Singleton Copley,
La reveno de Neptuno,
(1754)

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

L' estro de l' maro senlime vasta[2] serenavizaĝe
sternis paca l' ondaron kaj ekripozigis la ŝtormon,
kaj bridiĝinte ŝancelopeze kvietas nun l' ondoj.

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Ambaŭ-pelforte tremu, bat-instigite, la ŝipo.
Nun per ridet' al la maro donu konkordo ĉiela,
ke ĝi, movate de ventoj, kuru kun veloj gravedaj.

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Maron tranĉu la pruo, rivala je salto delfena,
kaj ĝi ĝemu abunde; ĉiu paradu perbrake
forte tirante; grizan sulkon spure ĝi fosu[3].

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Eĥe vi batu, nia ritmilo;[4] ni tamen "heja!" -
Maro remile ŝirate ekŝaŭmu; ni tamen "heja!" -
Plie per voĉoj persistaj la bordo resonu do "heja!"

<Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"[5]>



Edward Moran,
Ŝipoj en la maro,
(sen dato)

1 El *Carmina Codicum Saeculi IX*, nr 384 (Celeuma).
2 Estro de la maro - Neptuno.
3 Versoj 11-12 estas tekste ne certaj.
4 Teksto ne certa.
5 Verso aldonita.

## *Jen, la ŝipet'*

***de Kolumbano, mortis 615***[6]
*(latine: "Columbanus")*

Jen, la ŝipet', en arbaro hak-faligite, nun iras
laŭ la fluo de Rejn', oleita traonde ĝi glitas.

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Levas la blovon la ventoj, minacas hida pluvego,
sed kunigita fortec' de la viroj venkas la ŝtormon.

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Vipas fervore pluvbatoj, vipas akre tempesto;
ĉion venkas penado, venkas peza laboro[7].

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Tion eltenu, konservu vin sanaj por sorto favora[8],
ho suferintaj pligravon: eĉ tion ĉi finos la Dio.[9]

Heja ho viroj! Sonu rekrie eĥ' nia "heja!"

Tiel agas la fi-malamik'[10] lacigante la korojn;
per siaj hidaj tentoj li skuas la koro-intimon.

En via menso, kristanoj, memore sonu ĉi "heja!"

Staru firmaj spirite! La ruzojn de l' Fia malŝatu,
vin kuraĝe defendu per trafaj armiloj de l' Virto!

En via menso, kristanoj, memore sonu ĉi "heja!"

Firma fid' kaj sankta fervoro venkas pri ĉio,
kaj dumfuĝe la pra-malamik' siajn sagojn frakasas.


En via menso, kristanoj, memore sonu ĉi "heja!"

Kaj la Reĝ' de la Virtoj, ĉef-fonto, Povo Plejalta[11],
laŭrojn al la luktanto promesas, post venk' atribuas.

En via menso, kristanoj, memore sonu ĉi "heja!"



6 Ne estas tute certigita la aŭtoreco pri tiu ĉi poemo. Se vere ĝin verkis Kolumbano, ĝi devas datiĝi de la jaro 611/612. Sed la sola "pruvo" pri tio estas la apenaŭ plu legebla aŭtor-indiko *...anus* sur la sola ekzistanta manuskripto; tio same bone povus indiki *Hrabanus* (Hrabano) aŭ iun alian.
7 Vergilio - *Georgiko* I: 145.
8 Vergilio - *Eneado*, II:207.
9 *Eneado* II:199.
10 La diablo.
11 Dio.



# Nuboj...

**de Jorge José Gotardi**
*trad. Roger Gotardi*



Nuboj...

Kiom el vi mi vidis pasi,
kiom el vi ne vidis min resti.

Kiom estis tiuj, kiuj similis al tio aŭ tio alia,
en mia imagado.

Kelkaj al bestoj, aliaj al homoj, pejzaĝoj, montegoj,
kaj krom tio, vi imagu, al Nia Sinjoro.

Kiom estis la blankaj, malklaraj, la nigraj,
kiom estis la rozaj, la ruĝatonaj, la bluatonaj,
kaj kiom el vi estis ornamitaj de la kurado de l' ĉielarko.


Kiom estis la fojoj, kiam vi diskurtenis la horizonton,
lasante min poiome vidi la tutan ĉielbluon tage, kaj ĉiujn ĝiajn stelojn, kaj fojfoje eĉ la lunon,
kiam nokte.

Kiom estis la fojoj, kiam vi kaŝis tiun saman horizonton,
portante la mallumon, kaj reduktante plurfoje la jam rarajn esperojn.

Tra super mi, tra sub mi, vi pasis ...
kaj vi ankoraŭ daŭre pasas, ĉi tiam, ŝajne ĉiam pli kaj pli rapidaj.

Ĉu miaj tagoj mallongiĝas ?
ĉu eble mi aliras lante kaj konstante al la Pordo de la Eterneco?

Povas esti,
sed eble povas esti mi,
sen tempo ilin rigardi kiel iam,
akompanante iliajn evoluojn
maltrafante nenian movon.



La poeto kaj la tradukinto, patro kaj filo.

Povas esti mi, ĉi tiam,
provanta ne malfermi l' okulojn,
timanta la mallumon,
timanta la sunradiojn,
timanta vin tute ĉiujn, aŭ unu nuran, eble ...
timanta viajn formojn kaj tiujn, kiujn vi ekprenos,
la fulmegojn, kiujn vi montras, kaj la tondrojn, kiujn vi kaŝas.

Timanta ja,
esti knabo alifoje
kaj revivigi mian imagpovon,
kiu flugadis preskaŭ ĉiam tiom alte
kaj rapide, kiom vi ...

nuboj!



Akvofalo de la rivero Koteĵipo, en la urbeto "Salto do Lontra".

***Jorge José Gotardi*** naskiĝis la 6-an de julio 1953 en la bieneto de siaj gepatroj, etaj agrokulturistoj, en Bandeirantes, Paranao, Brazilo, kie li dum multaj jaroj loĝis. Tie li ricevis la bazan kaj mezgradan instruadojn, elkreskis kaj vivis ĝis la 70-aj jaroj, kiam li transloĝiĝis en Kuritibon. En la ĉefurbo de Paranao, li kursis juron ĉe la *Fakultato pri Juro de Kuritibo*, laboris, i.a., kiel bankisto, kaj partoprenis en la studenta movado - kontraŭluktante la diktaturon tiam regantan en Brazilo, pro kio li estis eĉ arestita. Poste li edziĝis kaj ekpatris la tradukinton de la poemo. Enmaniginte sian universitatan diplomon, li transloĝiĝis en "Salton do Lontra", por ekadvokati. La advokatecon li ekzercadas sindone kaj meritplene, kaj nun estas alte respektata advokato, fame konata pro siaj sukcesaj civilaj kaj kriminalaj aferoj. Li plue aktivis en la politika medio. En 1992, apogeis konkure al la urbestreco de "Salto do Lontra", sed ne estis elektita. Kredeble lia plej granda venko estis rajti ricevi rektajn voĉdonojn, kio estis neimagebla en la tempo diktatura. Jorge scipovas majstre kaj amplene kuiri. Liaj ĉefaj ŝatokupoj estas futbalo (spektado kaj ludado) kaj fiŝkaptado, ambaŭ iel preterlasitaj favore al vinberkultivado kaj vinfarado.

*El la portugala muzo...*

# *Reĝmortigo*

***de nekonata aŭtoro,***
*el tiama raporto de 1908-02-02*
*trad. Eduardo Novembro,*
*el la portugala*
*notoj de João José Santos*

EN ĈI TIU LOKO
LA UNUAN DE FEBRUARO 1908
MORTIS POR LA PATRUJO
LIA MOŜTA REĜO KARLO I
KAJ LA REĜA PRINCO
LIA MOŜTA LUDOVIKO FILIPO

Surmure najlita steleo entenas la ĉi-suprajn vortojn, honore al la samloke mortigitaj tiamaj reĝo, Don Karlo, kaj lia plej aĝa filo, la reĝa princo Don Ludoviko Filipo. La steleo estas ĉe la angulo de Placo de Komerco (por: Praça do Comércio ['prasa du ku'mersju]) — ceremonia perŝipa vizitenirejo de Lisbono — kun Strato de Arsenalo (por: Rua do Arsenal ['rua du arse'nal]).

* * *


Palaco de la dukoj de Braganso en Vilavisozo, de kie la reĝa familio deiris, en tiu fatala tago (foto de JJS, 2008-01-30).


Centra avenuo de Vilavisozo (foto de JJS en 2008-01-30).

Laŭ la akurata hortabelo (la 11-a horo kaj 30 minutoj) eliris el Vivoplena Vilaĝo (por: Vila Viçosa ['vila vi'soza])[1] trajno kondukanta la reĝan familion, invititojn kaj altrangulojn de la koncerna sekvantaro. La reĝo surmetis uniformon de ĉefgeneralo kun kapoto, la reĝino nigran kapveston kaj mustelan mantelon, la princo surtuton kaj klapĉapon. Senincidenta estis ilia veturado ĝis alveno al la relŝanĝiloj de Blanka Domo (por: Casa Branca ['kaza 'branka]), kie la lokomotivo kaj du vagonoj elreliĝis, feliĉe damaĝante neniun kaj nenion. Sed tio okazigis longan malfruiĝon. Do, la vaporŝipo "Moŝta Ludoviko" (por: D. Luiz ['dõ lu'ish]) atendita en Placo de Komerco je la kvara kaj kvarono posttagmeze, tien albordiĝis unu horon poste. Enorma kvanto da personoj atendis ene de la elŝipejo, pli-malpli same ne nur sur la kajo, sed ankaŭ sub la arkaroj de la Financa kaj Milita Ministerioj. Densaj vicoj da policanoj baris la scivolemularon.[2] Apenaŭ la ŝipo atingis ties placon, estiĝis kurioziga movado inter la pontpleniganta homamaso, kiu antaŭeniris al la akvoveturilo por ne perdi la unuajn impresojn pri la alveno de la reĝaj vojaĝantoj. Triborde sur la pobo sidis la tri regnuloj ridete rigardantaj al la ponto. Dume, la fervojaj servistoj metis la ŝtuparan irtapiŝon al la ŝipo. De ĉiuj flankoj salutataj, elŝipiĝis la reĝino tuj sekvata de la reĝo — kiu korege manpremis sian ĉefministron —, poste la princo, kaj laste la aliaj reĝaj personoj. Fronte al la elŝipejo, la reĝa familio enveturis en tie starantan kaleŝon, kiu, tirata de du belaj hanoveraj ĉevalparoj instigitaj de la koĉeroj, tuj ekiris tra Placo de Komerco. Nek je la elŝipiĝo, nek je la ekiro de la kaleŝo, nenian popolan manifestacion audiĝis el inter la ĉirkaŭanta amasiĝo, kiu, male, spektis la defiladon senemocie, pluraj eĉ malfid-kaj timeme. Ŝvebis kvazaŭ timiga etoso malbone aŭgurante fatalan okazontaĵon. Anksie mienaj grupoj rondiris pretere.


Placo de Komerco, Lisbono. En la kontraŭa flanko de la strata arko fluas la rivero Taĵo.


Pentraĵo de la rivero Taĵo, la Ponto 25-a de Aprilo, kaj la Reĝa Kristo.

Precize la antaŭan tagon, la 31-an de januaro, la reĝo estis subskribinta dekreton trudpelontan el la lando aŭ ekzilontan al la tiamaj portugalaj transmaraj kolonioj personojn verdiktitajn de iuj deliktoj "kiam la superaj interesoj de la ŝtato tion pravigos".

Alproksimiĝanta al la lasta okcidentflanka arkaro, malrapide radiris la kaleŝon, kiam iu juna individuo eksaltis al sur ties malantaŭaĵon, kaj ektuŝe per du revolveraj pafoj atingis lian moŝtan Karlon, kiu, kun la kapo pendanta, tuj forsvenis morte trafita. La murdisto (poste identigita, kiel komerca komizo) estis siavice mortigita de lia moŝta princo, kiu, sin levante, rapidege pafis lin. Ĉio

1 Vivoplena Vilaĝo situas ĉ. 200km sude de Lisbono, en la regiono Alenteĵo, ĉ. 15km de la redaktejo de La Karavelo. Kvankam la nomo, ĝi estas urbeto, ne vilaĝo, kaj nepre vizitinda pro ĝia beleco. Tie situas unu el la preferitaj palacoj de la murdita reĝo Don Karlo. Krome, ĉ. la sama epoko, en tiu urbeto naskiĝis la portugala poetino *Florbela Espanca* [flor'bela 'shpanka], kies sonetoj iam aperos en La Karavelo.

2 La vojaĝo estis farita trajne kaj ŝipe. Nune la vojaĝo de Vivoplena Vilaĝo al Lisbono fareblas en du horoj, per aŭtomobilo aŭ per buso.



okazis en apenaŭaj sekundoj. Ne haltante, la kaleŝo turnis post la stratangulo kaj eniris en Strato de Arsenalo. Sed tiam, alia individuo (identigita, kiel instruisto de privata lernejo), staranta sub la arkaro de la Reĝa Ministerio, demetfaligis teren sian envolviĝantan kapuŝmantelon, kaj per kaŝita karabeno celpafis la princon, kiu nur malmultajn minutojn postvivis. Vipitaj de la koĉeroj, la ĉevaloj rapidegigis la kaleŝan iradon tra la spaco inter la tragedio kaj la pordo de la Mararmea Arsenalo, tien abrupte enirante. La dua murdisto rezistis al la policanoj, sed estis de ili forte fikstenita kaj ankaŭ mortigita. La infanta moŝto Manŭelo (por: D. Manuel ['dõ ma'nŭel]) estis ĉebrake vundita. Hororaj scenoj postsekvis la dramon kaj sur la krimloko mem kaj en la tuja ĉirkaŭaĵo. Multdekoj da senkulpuloj estis arestitaj, junan komizon la politika polico malfeliĉe mortigis. Abomeninda estis la momento en kiu ĉiuj senprudentiĝis. Eĉ la plej kuraĝaj homoj ne povis sciigi tion, kio estis okazanta, kaj kvazaŭ freneziĝis. Iuj forkuris nenien, policanoj kuradis tien kaj reen. Perturbitaj, erarvangantaj, tiuj sin trovante tie en tiu momento kuradis malsamdirektojn, kiujn ili post kvietiĝo ne sukcesis priskribi. Tia konfuziĝo tuj disvastiĝis sur la urbocentrajn stratojn, kie oni nur videblis homojn senorde kurantaj en malajn direktojn, butikistojn fermantajn la pordojn de siaj vendejoj, ĉiuj terurmiene afliktiĝintaj.

En Placo de Komerco, la kaleŝoj koliziis unu kontraŭ la aliaj, la ĉevaloj trotegis hufofrape, aŭdiĝis kriegoj ĉiuflanke, kaj timegiga voĉbruado de la amaso en infera "saviĝu tiu, kiu povu!".

La kadavroj de la reĝaj mortigitoj jam ripozis kovritaj per la nacia flago.

Horojn poste, timante ontajn okazaĵojn, la popolanoj grandnombre komencis alflui al panbutikoj kaj spicejoj por sin provizi per nutraĵoj. Tiunokte la spektakloj estis nuligitaj, la Lisbona loĝantaro restis hejme, kaj ŝajne la tuta urbo restis en ordo bone garantiita de la soldataro patrolanta la stratojn.

Lasthore: la ministra konsilantaro proklamis reĝon lia sinjora moŝto Manŭelo. La reĝo mortis, vivu la reĝo!



Konsekvence oni liberigis la arestitajn politikistojn, oni nuligis la plej drastajn dekretojn, oni invitis la tiaman diktatoron ellandiĝi. La portretojn de la murdistoj, Alfredo Luiz da Costa (la komerca komizo) kaj Manuel dos Reis Buíça (la instruisto de privata lernejo), troabunde diskonigitaj, oni vendis surstrate. Oni organizis monpetadon por iliaj familianoj kaj pli malfrue iliaj tomboj aperis plenplenaj de floroj.[3]

* * *

La supre priskribita tragedio okazis ĝuste antaŭ unu jarcento; sed la portugala popolo treege evoluis ekde tiam, kaj multe pli civiliziĝis, do eblas, ke la nuntempaj estroj regu memvole, ne riskante similan fatalaĵon.

Sur tiu sama muro, malsupre de la menciita steleo, nekonato, per ŝprucigilo, manskribaĉis la nomojn Costa ['koshta] kaj Buíça [bu'isa].

---

*Hungario bukedas...*



## *Malgajite*

*(hungare: Boldogtalan voltam)*

***de Sándor Petőfi***
*trad. Imre Szabó*

Mi tra l' tuta vivo
vivis malgajite;
min konsolas nur, ke
tute senmerite.

Mi malgaja estos
jam ĝis la sepulto;
min konsolas nur, ke
mankas ne tro multo.

Vane vi parolas,
logojn vi mencias –
mi ne longe vivos,
mi jam certe scias.

3 Jes, kara leganto, tre ofte la popoloj estas barbare maljustaj.

*En karavelo esperantisma...*

# La lastaj portugaliaj reĝoj

**de João José Santos**

La reĝo Don Karlo naskiĝis en 1863, en Lisbono, urbo kie li estis murdata en 1908. Li estis la antaŭlasta reĝo de Portugalio, kaj nomiĝis "Carlos Fernando Luís Maria Victor Miguel Rafael Gabriel Gonzaga Xavier Francisco de Assis José Simão de Bragança Sabóia Bourbon e Saxe-Coburgo-Gota". Li estis kunfamiliano kun plejparto de la tiatempaj eŭropaj nobelfamilioj.


Don Karlo, 35-a reĝo de Portugalio.

Don Karlo edziĝis al Don Ameljo de Orleano (por.: Dona Amélia de Orleães), franca princino, kaj la lasta reĝino de Portugalio. Ŝi estis la unua filo de la grafo de Parizo, Ludoviko Filipo de Orleano (nepo de la lasta reĝo de Francio, Ludoviko Filipo). Don Ameljo fondis institutojn por helpo al malsanuloj kaj al malriĉuloj, muzeojn kaj estis fakte tre agema reĝino, kiu honoris sian originan patrion kaj sian reĝlandon. Ŝi mortis en sia loĝejo en "Versalles" en 1951. Don Ameljo estis baptopatrino de Don Duarto Pio, la duko de Braganso, aktuala pretendanto al la trono de Portugalio. Ĉi tiu sinjorino ĉeestis la barbaran mortojn de la edzo kaj de la unua filo, en 1908, kaj devis ankoraŭ prisuferi la morton de la dua filo, la lasta reĝo de Portugalio, Don Manuelo la dua, en 1932, tiam ekzilita en Britio.


Don Ameljo de Orleano, lasta reĝino de Portugalio.



Don Ludoviko Filipo, reĝa princo de Portugalio.


Don Karlo estis mallerta politikisto, kiu ne scipovis aŭskulti la popolon, kvankam estis talenta diplomato. Li estis tre klera viro, entuziasma por la teknologioj de sia tempo. Don Karlo instaligis elektron en "Palácio das Necessidades" kaj planis elektrumi la stratojn de Lisbono. Li estis amanto de fotarto kaj aŭtoris la fotaron de la reĝa familio. Kiel pentristo li estis tre talenta, ŝatanta ĉefe pentri birdojn, ĉar ja la ornitologio estis unu el liaj pasioj. Krome, Don Karlo profunde studis oceanografion kaj fondis la akvariejon Vaskon da Gamo, proksime de Lisbono. Kelkaj el liaj oceanografiaj laboroj pioniris internacie. Don Karlo ankaŭ estis plenmerita agrokulturisto, kiu produktigis la oldajn kampojn de la Domo de Braganso. Li produktis vinon, olivoleon, korkon kaj aliajn produktojn, krome li bredis ĉevalojn.


Don Manuelo la dua, lasta reĝo de Portugalio.

* * *

Inter 1143 kaj 1910, Portugalio vivis ĉ. 800 jarojn sub diversecaj monarkioj, en kvar dinastioj. La murdo de la reĝo Don Karlo kaj de lia unua filo, la reĝa princo Ludoviko Filipo, malfermis pordojn al la respubliko. Ĉu la portugala popolo gajnis per tiu ŝanĝo? Ĉu la tiatempa konstitucia monarkio estis malpli demokratia ol la nuna demokratia respubliko? Honesta respondo ne estas facila, sed la jeno estas certa: la lando en kiu oni fimurdis la reĝon, kiu estis klera homo, specialisto pri oceanografio, pri ornitologio kaj kiu pentris artisme; tiu lando, post 100 jaroj, havas sur la prezidanteco ekonomikan teknikiston, kies banala kulturo estas evidenta, kaj kiu tre mallerte publike parolas. La ĉefministro montras fortan emon diktatoriĝi, kaj la popolo mokas lin pro la suspekto, ke lia licenciiĝo estas fraŭdo.


Lasta flago uzata de la portugalia monarkio.


Aktuala flago de Portugalio, kreita de la respubliko.

Se unuflanke, laŭ okuloj de respublikano, estas nekompreneble, ke unu familio havu reĝajn privilegiojn super la aliaj familioj de la nacio; aliflanke, laŭ okuloj de minimume klera homo, la aktualaj eŭropaj socioj estas regitaj de teknokratoj, kiuj hontigas siajn popolojn, ĉar ne havas minimumajn klerkondiĉojn reprezenti kaj regi ilin.

Iel ajn, antaŭ la dubo, ĉu la ŝanĝo kompensas aŭ ne, la digneco scias, ke neniu havas la rajton ŝteli la vivon de homo.



# Urbeto "Vila Viçosa", en Portugalio

**de João José Santos,**
*fotoj kaj tekstoj (2008-01-30)*

Live, palaco de la dukoj de Braganso, la kvara kaj lasta portugalia reĝa dinastio.
De ĉi tiu palaco, la reĝo don Karlo kaj la reĝa princo Ludoviko Filipo deiris por renkonti la morton en Lisbono.



Unu el la diversaj preĝejoj de Vila Viçosa.



Alia preĝejo, apud la kastelo.




Turo de la kastelo.



Muro de la kastelo.



Strato en la malnova kvartalo. Tie la stratoj estas mallarĝaj.



Vidado super la urbeto, de la kastelo.



Ĉefa avenuo. Live kaj angule la Teatro "Florbela Espanca".



Vidado super urbeta flanko. Videblas la kastela muro.



Interna korteto de la muzeoj de arkeologio kaj de ĉaso.